# LA ŜALMISTO DE HAMELIN




AIMS INTERLINGO

AIMS International Books, Inc.



ŝalmisto





urbestro



rato



ratoj



domoj




urbo




infanoj



virinoj



La virinoj estas gajaj.



viroj



La viroj estas gajaj.



La infanoj estas gajaj.



La viroj estas tre malgajaj.

# LA ŜALMISTO DE HAMELIN





AIMS INTERLINGO

AIMS International Books, Inc.




En la urbo
Hamelin
estas multaj domoj.


# Estas multaj viroj




kaj multaj virinoj



kaj multaj infanoj.







Sed la urbo Hamelin
estas tre malgaja,



ĉar en la domoj
estas multaj ratoj.


La tutan tagon la virinoj diras,
"Kiel malgajaj ni estas!
Kial estas tiom da ratoj
en ĉi tiu urbo Hamelin?"







La infanoj diras al la virinoj,
"Kial oni ne pelas la ratojn el la urbo?"



Kaj la virinoj diras
al la viroj,

"Kial oni ne pelas la ratojn
el la urbo?"





Kaj la viroj
iras al la urbestro
kaj diras,

"Kial oni ne pelas la ratojn
el la urbo?"




Kaj la urbestro diras,
"Mi ne povas."




Kaj la tuta urbo
estas tre malgaja.




Iun tagon ŝalmisto
vizitas la urbon.



“Kiel malgaja estas la urbo,”
diras la ŝalmisto.



"Jes," diras la infanoj.
"Estas multaj ratoj
en la urbo."




"Kial oni ne pelas la ratojn
el la urbo?"
diras la ŝalmisto.

“La virinoj ne povas fari tion,” diras la infanoj.



"La viroj ne povas,



kaj la urbestro ne povas."





"Ho," diras la ŝalmisto.
La ŝalmisto pripensas.

La ŝalmisto iras al la urbestro
por diri,
“Estas multaj ratoj
en via urbo.”





“Jes,” diras la urbestro, tre malgaja.
“Kial oni ne pelas la ratojn
el la urbo?”
diras la ŝalmisto.

“Mi ne povas tion fari,”
diras la urbestro.






"Se vi pagos al mi cent spesojn,"
diras la ŝalmisto,

"Mi pelos la ratojn
el la urbo."







"En ordo," diras la urbestro.
"Se vi pelos la ratojn el la urbo,
mi pagos al vi cent spesojn."

La ŝalmisto trairas
la stratojn de la urbo.
Li muzikas per sia ŝalmo.



La ratoj kuras
el la domoj
kaj sekvas la ŝalmiston.



La ŝalmisto promenas
laŭ la vojo
muzikante per ŝalmo
kaj la ratoj lin sekvas
en la arbaron.





Kiel gaja
estas la urbo!

En la domoj
ne estas ratoj.



La infanoj estas gajaj.





La virinoj estas gajaj.

La viroj estas gajaj.



Sed la urbestro estas malgaja.







"Mi devas pagi al la ŝalmisto
cent spesojn," diras la urbestro

"Mi estas tre malgaja."



La ŝalmisto revenas
al la urbo
por viziti la urbestron.








"Pagu al mi cent spesojn,"
diras la ŝalmisto.

Sed la urbestro pripensas
dum momento kaj diras,





"Salmisto,
nun ne estas ratoj
en la urbo Hamelin."




Mi ne pagos al vi
cent spesojn."




"Vi ne estas honestulo,"
diras la ŝalmisto.





"La urbanoj de Hamelin
estos tre malgajaj."

La ŝalmisto trairas
la stratojn de la urbo
kaj muzikas per sia ŝalmo.



La infanoj kuras
el la domoj
kaj sekvas la ŝalmiston.



La ŝalmisto promenas
laŭ la vojo.
Li muzikas per sia ŝalmo.
La infanoj lin sekvas
al la arbaro.





Kiel malgaja
estas la urbo!

La viroj
iras al la urbestro
por diri,



“Kie estas la infanoj?
Vi estas kulpa.



Vi ne estas honestulo.”



“Sed ne estas ratoj
en la urbo,”
diras la urbestro.



"Jes, ne estas ratoj
en la domoj
sed ankaŭ ne estas infanoj."



Kaj la viroj
estas tre malgajaj.

La virinoj
iras al la urbestro
por diri,





"Kie estas la infanoj?
Vi estas kulpa.
Vi ne estas honestulo!"

“Sed ne estas ratoj
en la domoj,”
diras la urbestro.





“Jes, ne estas ratoj,
sed ankaŭ ne estas infanoj.”
Kaj la virinoj estas tre malgajaj.

Iun tagon diras virino,
"La urbestro diras,
ke ne estas ratoj
en la urbo."



"Jes," diras la aliaj virinoj.



“Sed estas unu rato!”
diras la virino.

“Kie estas la rato?”
diras la aliaj virinoj.




"Ni iru," diras la virino.
Kaj ĉiuj virinoj
ŝin sekvas.



“Jen la rato!”
diras la virino.
“Ĝi estas la urbestro.



Li ne estas honestulo!”



"Jes! Jes!" diras la aliaj virinoj.

"Kie estas la infanoj?"



Kaj la virinoj
pelas la urbestron
el la urbo Hamelin.



En tiu momento
la ŝalmisto revenas
el la arbaro.




"Kie estas la urbestro?"
diras la ŝalmisto.

"Ni lin pelis
el la urbo,"
diras la virinoj.





“Bone! Bone!”
diras la ŝalmisto.
“La urbestro
ne estas honestulo.”





"Sed, ni estas honestuloj,"
diras la urbanoj.
"Ni pagos al vi
la cent spesojn."



Estas cent viroj
en la urbo.
Ĉiu viro
pagas unu speson.

“Jen cent spesoj,”



diras la viroj.




La ŝalmisto promenas
laŭ la vojo
kaj revenas kun la infanoj.



"Ankaŭ mi estas honestulo,"
diras la ŝalmisto
"Jen la infanoj.





Kaj ne estas ratoj
en la domoj
de la urbo."






Fine la urbanoj
estas tre gajaj.




Sed la urbestro
loĝas en la arbaro
kun la ratoj
kaj neniam, neniam, neniam
revenas al la urbo Hamelin.



- lernu.net
- duolingo.com
- konoj.org




- vortaroj.org



- esperanto.net
- esperanto.be